

Matematika terminologio

Ĉu matura finfine ?

(KAEST 2002 — 9^a de Novembro 2002)

Ĉefaj karakterizaĵoj de la terminaroj

<i>Aŭtoro</i>	<i>Siglo</i>	<i>Aperjaro</i>	<i>Terminoj</i>	<i>Fontidlikoj</i>	<i>Pravigoj</i>	<i>Difinoj</i>	<i>Ekzemploj</i>	<i>Tradukoj</i>
Bricard	[RB]	1905	~500	ne	ne	ne	ne	ne
Hilgers	[HY]	1980	460	ne	ne	jes	ne	en, da, de, fr, it, ne, pt
Deneva	[DD]	1985	753	ne	ne	ne	ne	bg, ru
Werner	[JW]	1990	3722	ne	ne	ne	ne	cz, de
Reiersøl	[OR]	1994	~700	ne	jes	jes	ne	en
Pokrovskij	[SP]	1995	ne sciate	jes	kelkaj	jes	ne	en, fr, ru

Emo specifigi la terminologion

- Kiel krei matematikan terminon?
 - Krei novan, specifan radikon
 - Surbaze de “internacieco” (*entjero, reelo, progresio,...*)
 - Reuzi ekzistantan materialon
 - Surbaze de “internacia” metaforo (*aro, realo, vico,...*)
 - Krei kunmetaĵon el ekzistanta materialo
 - Surbaze de “internacia” metaforo
 - Vera kunmetaĵo (*angulfidela*)
 - Kunligo de pluraj vortoj (*inversa bildo*)

Emo specifigi la terminologion

- La emo krei specifan radikon plifortiĝas
 - Pli-malpli seriozaj pretekstoj
 - › Pluderivado
 - reala > reala nombro, realo
 - realo > reala vektora spaco
 - › Necesa distanciĝo de la vulgara senco (reala, propra)
 - Provoj pravigi la neologismon per scienca vortfarado
- Sed ekzistas ankaŭ mala dogmo
 - “Reuzismo”

Emo specifigi la terminologion

Matematika termino	Nefaka ekvivalento	Pola termino
entjera	*integra / *tut(ec)a	całkowity (<i>tuta, kompleta</i>)
racionala / #raciona	*racia	wymierny (<i>mezurebla, kalkulebla</i>)
reela	reala	rzeczywisty (<i>reala</i>)
kompleksa	kompleksa / *malsimpla	zespólny (<i>kunmetita</i>)
imaginara	*imaga	urojony (<i>imagita</i>)
lineara	linia	liniowy (<i>linia</i>)
eksponencialo	eksponenta funkcio	funkcja wykładnicza (<i>eksponenta funkcio</i>)
radiuso	radio	promień (<i>radio</i>)
rivolua (solido)	rotacia (solido)	obrotowy (<i>rotacia, rotacianta</i>)
ajgeno / #ejgeno	propra valoro	wartość własna (<i>propra valoro</i>)

“Pekoj” de la scienca vortfarado

› Jekci kaj la famili'

Naturalisma termino	[P1]/[P2]	[HY]	[SP]
*injekci/o	en/jekci/o	en/ĵet/a funkcio	dis/ĵet/o
surjekci/o	sur/jekci/o	sur/ĵet/a funkcio	sur/ĵet/o
bijekci/o	bi/jekci/o	inversigebla funkcio	dis/sur/ĵet/o


› La malfeliĉoj de *ortocentro*

Difino	[PV]	[P1]	[P2]
Intersekcopunkto de la tri altoj	ortocentr/o	ort/o/centr/o	alt/o/centr/o
Intersekcopunkto de la tri mezortantoj	(nomon ne havas)	(nomon ne havas)	ort/o/centr/o

› La malfeliĉoj de *malsimetria*

Difino	[P1]	[JW]	[P2]
xRy implicas yRx	simetria	simetria	simetria
xRy kaj yRx ne povas esti samtempe veraj	malsimetria	malsimetria	(nomon ne havas)
xRy kaj yRx implicas, ke $x=y$	(nomon ne havas)	antisimetria	malsimetria

“Pekoj” de la sciencia vortfarado



“Pekoj” de la scienco vortfarado

- Glob/in/o (“substanco eltirata el la globoj”)
 - Fakte el la globuloj, pli precize eritrocitoj (= hemooj)
 - Globul/in/o? Hemo/in/o?
- Hemoglobino
 - Kiel analizi?
 - hem/o/glob/in/o (“globino iel rilata al hemo”)
 - Hemoglobino = hemo + globino
 - hemo/glob/in/o (“globino iel rilata al eritrocitoj”)
 - Ambaŭ estas iel malĝustaj

“Pekoj” de la sciencia vortfarado

- Hemat/om/o (“tumoro el hemato”?)
 - Hemato, hemoo, hemo...
- Estus pli saĝe konsideri, ke
 - tiuj ĉi vortoj ne estas E-aj kunmetaĵoj,
 - ilia strukturo estas tamen analizebla
 - sed per vortfaraj konsideroj en la fontlingvoj

Kelkaj solvoj

- Pli bone koncepti sciencan vortfaradon
 - Vera E-a afikso estas uzebla
 - Kun ajna radiko, se la senco permesas
 - ne nur kiam la kunmetaĵo aspektas internacia aŭ kun ĉi-cele elpensita radiko
 - Memstare.
 - La vere E-a vortfarado baziĝas sur malfacile ellaborita teorio, kiun ne respektas la sciencaj kunmetaĵoj
 - Sciencan vortfaradon ekzistas, sed situas sur alia plano ol la vere E-a
 - Radikfarado

Kelkaj solvoj

- Pli bone kunlabori
 - Dividi la laboron, diskuti, uzi la modernajn ilojn
 - Ekzemplo de projekto REVO
 - XML
 - Artikola strukturo
 - ne nur difinoj, ekzemploj, tradukoj
 - sed ankaŭ fontoj, interterminaj semantikaj ligoj, rimarkoj (pri sencaj nuancoj, historio, terminologiaj pravigoj) kaj administraj notoj

Kelkaj solvoj

- Ekzemplo de aperonta terminaro

densa

167 [HY, §73] (p.p. subaro **A** de topologia spaco, rilate al subaro **B** de la sama spaco) Tia, ke ĉiu punkto¹ en **B** estas adhera¹ al **A** : *ĉiu subaro estas densa rilate al si mem; A estas densa rilate al B, se kaj nur se la adheraĵo de A inkluzivas B; subaron densan rilate al la tuta spaco oni nomas ĉie densa.* [dichte (Teilmenge) | dense | dense | плотное (подмножество)] Rim. La sama termino aperas ankaŭ en [RB, p.18], tamen nur alude. Notindas, ke foje oni anstataŭigas „adhera“ per „akumuliĝa“ en la difino, el kio sekvas, ke subaro ne nepre estas densa rilate al si.

Konkludo

- Restas ankoraŭ multo por fari
 - Nesufiĉaj progresoj en unu jarcento
- La fonto de la problemoj estas klara
 - Nesufiĉa kono/agnosko de la “tradicio”
 - Dogmaj kondutoj
 - Misuzo kaj miskonceptado de scienca vortfarado
- Sed novaj iloj povas helpi
 - En pli bona kunlaborado
 - Atingi pli profesiajn kaj efikajn labormetodojn